Kara s-ro Selimi, koran dankon pro via mesagxo. Mi tre gxojas, ke vi interesigxas pri la instruo de Bruno Gröning. Ni sendos al vi enkondukon-materialon. Cxu vi jam vidis en niajn interret-pagxojn? Tie vi povas legi informojn pri la instruo en Esperanto. Cxu via edzino ankaux interesigxas pri la instruo, cxu estas gxuste, ke sxi estas kuracistino? Mi parolis kun s-ro Meier, la gvidanto de Esperanto en nia Amikaro pri via penso, inkluzivigi nian materialon en via dumontan bultenon. Li gxojis pri tio. Tiam ni sendos al vi artikolon. Bv. informi nin.

Mi havas demandon, cxu vi estas preta, ke vi estos enkondukita en la instruon de Bruno Gröning. Tiu informprelego estas nepre necesa, cxar tiam vi estas ligita kun Dio kaj Bruno. Vi lernas akcepti la Dian forton, kiun ni nomas Heilstrom (en la germana) kaj vi lernas la Diajn legxojn. Pere de cxi tiu Heilstrom, kiun oni povas akcepti minimume dufoje tage, la homo povas akiri sian sanigxon kaj ricevas helpojn en la cxiutaga vivo, ankaux en financaj aferoj. La homo nur bezonas akcepti la Heilstrom cxiun tagon kaj devas peti por cxio.

En la Amikaro ekzistas ek de 1992 Medicin Scienca Fakgrupo (MSF) kun kuracistoj el la tuta mondo. Ili okupigxas pri la sanigxojn, kiuj okazas en la Amikaro. Ankaux ili faras informprelegojn en la tuta mondo. En auxtuno la kuracistoj faris 196 prelegojn en Norda Ameriko, la duan fojon en multajn grandajn urbojn. Pli ol 3000 homoj venis en la Amikaro.

Mi kore salutas vin kaj deziras al vi cxion bonan. Mi atendas vian respondon.

via Edith Henrici

## Revuo Esperanto por januaro 2007

☆ Reta Jarlibro <reto@uea.org> to me

More options 14-Dec (3 days ago)

Estimataj membroj-abonantoj de UEA,

En la retejo [UEA.ORG](http://uea.org) jam estas elshutebla la PDF-versio de la januara numero de la revuo Esperanto por 2007. Ghi estas jam alirebla por la membroj-abonantoj de 2007 kaj ankoraŭ prenebla por la membroj-abonantoj de 2006.

La enhavlisto de la numero:

\* Malferme: Novjara mesagho de la prezidanto: Mi pli multe ricevis ol donis (Renato Corsetti).

\* Herzberg, la Esperanto-urbo (intervjuo kun Peter Zilvar).

\* Mesagho de Europa Forumo (Seán Ó Riain).

\* Konferenco pri la lingva politiko en Europa Unio (Ján Vajs).

\* KAEST 2006: Ne nur pri „Lingvo kaj Interreto“ (Detlev Blanke).

\* Ni salutas la kvinjaran pagharon (intervjuo kun Katalin Kováts).

\* Malferma Tago en nova medio (GaKo).

\* Nia enketo: La revua enketo surprizis, sed ne nur (Jukka Pietiläinen).

\* Recenzoj: Vinko Ošlak pri Ni ne estas senpovaj / Nie sme bezmocní.

\* Jorge Camacho pri Civilizacio. Strika tango.

\* Anna Löwenstein pri Infantravivaĵoj. Autobiografia rakonto.

\* Jorge Camacho pri Raportoj el Japanio 8.

\* La angulo de EVA: Miyamoto Masao: el La rememoro jam fora.

\* Laste aperis.

\* Anoncetoj. Nova voluntulino de TEJO che UEA.

\* Oficiala informilo. OSIEK-premio 2006. Loke-Fake-Persone:

Togolando. Chinio.

\* Tra la mondo: Kristnaska abio. Pakistano: Virina laborejo kaj tria

kunsido (Shabbir Ahmed Sial).

\* Astrofiziko en Xi'an, Esperanto en Pekino (A. Wandel). Parko de Milan

Zvara (S. Marček).

\* Forpasoj. Internacia Semajno de Amikeco. Krucenigmo (Stano Marchek).

Por elshuti la numeron bonvolu viziti retpaghon <http://reto.uea.org> (unuafojaj venintoj bezonas registriĝi).

La PDF-versio de la revuo Esperanto estas trovebla sub la menuero TEKO -

kune kun pluraj antaŭaj numeroj. Junaj membroj trovas tie ankaŭ PDF-versiojn de revuoj TEJO-tutmonde kaj Kontakto.

\*\*\* Pardonpeton, se la informo vin ne interesas. Bonvolu sciigi al [reto@uea.org](mailto:reto@uea.org) se vi ne plu deziras ricevi sciigojn pri la PDF-versio.

Amike,  
Andrej Grigorjevskij,  
volontula prizorganto de [UEA.ORG](http://UEA.ORG)

**You're invited! Join ELNA-Kongreso-2007 today.** Inbox

[☆ELNA-Kongreso-2007 moderator](#)

[<ELNA-Kongreso-2007-owner@ya](#)

mo estas por la 2007 ELNA kongreso en San Diego, Kalifornio / Meksiko, je la 27a ĝis la 30a de julio, 2007. la forumo se vi planas cxeesti, volus helpi plani la eventon, aux volus volus diskuti pri la temo de via prelego kun la organizantoj. mentoj kaj sugestoj cxiam estas bonvenaj.

s for the 2007 ELNA convention in San Diego, CA and Tijuana, MEX, July 27-30, 2007. the forum if you plan to attend, would like to help plan the event, or o present a lecture and want to discuss your presentation with the mments and suggestions are always welcome.

s para el congreso de ELNA de 2007, en San Diego, California y Baja California, de julio 27 al 30 de 2007. o si deseas participar, ayudar a planear el evento, o te gustaria hacer racion y deseas discutir el tema de ella con los organizadores. entarios y sugerencias seran siempre bienvenidos!

## **Asbesto - bonvolu plenigi la demandaron (se vi povas)**

Karaj AVE-anoj,



Jen interesa demandaro pri la (ne-)uzo de asbesto.

Bonvolu plenigi kaj sendi vian respondon (se vi povas dedichi 10 minutojn por ghi).

Al Bolonja Esperanto Grupo A.Tellini-1912

La prezidanto [D.ro](mailto:D.ro) [Prof.ro](mailto:Prof.ro) Daniele Agostini

[gesperbo@iperbole.bologna.it](mailto:gesperbo@iperbole.bologna.it)

-----

Karaj gesamideanoj,

Antau^ tri monatoj, mi skribis al multaj e-adresoj (Esperantistoj, pos^t-listoj, naciaj au^ regionaj organizacioj ) kaj mi petis helpon por enketo pri \_konado pri asbesto\_.

Pro iuj taskoj mi malfruis, kai mi hodiau^ refoje sendas invitleteron, kaj, kune, demandaron.

Marg^ene de la agado de internacia laborgrupo pri sekureco en laborejoj, loka reprezentanto de \_Ban Asbestos\_ proponis kolektadon de informoj por studi nivelon de kono, c^e nefakuloj, pri la dang^eroj de amianto; aparte gravas taksi konon

A) pri riskoj por la sano

B) pri valida normaro

C) pri realigo de iloj (c^u teknikaj, c^u juraj) por la protekto de la log^antaro kaj de la laboristoj.

Tiu c^i enketo koncernas c^iujn Landojn, sed konsideras c^efe la situacion de la evoluig^antaj Landoj, pro ilia pli granda malforteco je la premado de la merkato.

La enketo estis proponata al Bolonja Esperanto Grupo, pro la konektoreto de Esperantujo, kiu ebligas atingi multnombrajn personojn en multaj Landoj.

Tiu c^i enketo plenumig^as per retpos^to:

- ni sendas (c^i-sube) demandaron kompletigendan kaj resendendan;

- poste ni taksos la enhavon de la respondoj;

C^iujn infomojn tuj oni igos sennomaj, kaj identeco de respondantoj neniam estos rekonebla

La esplorado celas konatigi percepton de amiantorisko, kaj krome intencas taksi

a) Esperanton kiel internacian kontaktilon por kolekti informojn, kaj

b) Esperantan komunumon kiel interparolanton por sciencaj celoj.

Rezultojn de c^i-tiu rilato de esplorado produktos doktoran disertacion c^e la Fakultato je Modernaj Lingvoj de la Universitato de Bolonjo.

C^iuj rezultoj estos komunikataj al la partoprenantoj kaj al la kunlaborintoj, kaj oni diskonigos rezultojn en Esperanto medio, per propono de kongresaj prelegoj kaj de atikoloj en revuoj.

Do ni petas

- Ke vi subtenu tion c^i studadon;
- Ke vi dissendu tiun-c^i mesag^on kun demando al Esperantistoj, al retlistoj, al Grupoj kaj al grupanoj kiujn vi konas;
- Ke vi informu pri tiu c^i esploro la personojn kun kiuj vi estas en kontakto por helpi ilian alig^on al la esploro mem;
- Ke ankau^ vi plenigu persone la demandaron al vi senditan.

Ni g^oje fidas vian helpon kaj dankas vin tre kore.

Bolonja Esperanto Grupo "Achille Tellini 1912" - Via Avesella 16 - I 40121 Bologna (Italia)

La Prezidanto [D.ro Prof.ro](mailto:D.ro Prof.ro) Daniele Agostini

[gesperbo@iperbole.bologna.it](mailto:gesperbo@iperbole.bologna.it)

## DEMANDARO

-----

### ATENTU:

- Por ke tiu c^i teksto estu legebla de c^iuj, ni uzas post-metitajn c^apeletojn anstatau^ supersignataj literoj.
- Bonvolu sendi reen tiun c^i demandaron, skribinte viajn respondojn inter la linioj de la demandoj.
- Vian e-adreson ni havis el listoj publikaj au^ publikigitaj.
- Bonvolu skribi c^u vi konsentas ke ni detenu vian propran e-adreson (au^ tiun el kiu vi skribas): ni uzu g^in NUR por sendi al vi la rezultojn de tiu c^i enketo.
- Au^ c^u vi preferas ke ni eliminu TUJ vian e-pos^tan adreson.
- Au^ c^u plac^as al vi ke ni liveras al vi pluajn informojn pri asbesto kaj pri temoj rilataj al la defendo de sano kaj medio.

-----

## DEMANDOJ

1) El kiu Lando, regiono, urbo vi skribas al ni?

2) Kia estas via sekso? C^u vira au^ virina?

3) Kiom ag^a vi estas?

4) La asbesto estas materialo diverstalenta malmultekosta sekura (je iuj rilatoj) kaj praktika. C^u vi konas uzojn de asbesto? Bonvolu skribi iujn.

5) C^u vi scias ke la asbesto povas kau^zi gravajn malsanojn c^e la homo?

6) C^u en via Lando ekzistas prilaborado de asbesto?

se jes, en kiuj laborsektoroj?

- minekstraktado
- prilaborado de materialoj (teksaj^o, asbesto-cemento, konstruaj^oj, aliaj)
- rub-liberig^o

7) C^u vi estas informita pri iu ajn persono, kiu suferis malsanon pro asbesto?

**8) Ĉu vi scias, ĉu ekzistas en via Lando leg^oj por limigi uzadon de asbesto?**

**9) Ĉu vi scias, ĉu ekzistas, en via Lando, normoj por protekti la personojn kiuj prilaboras asbeston?**

**10) Ĉu vi scias, ĉu ekzistas en via Lando leg^oj por defendo de medio en temo de asbesto? (limigoj en la uzo, reguloj por liberig^o)**

**11) Ĉu vi kapablas indiki en kiuj lokoj au^ situacioj asbesto estas pli alestanta en via Lando?**

**(minaj sitoĵ, industrio aktiva, industrio forlasita, rubaj^oj)**

**12) Ĉu vi scias ĉu ekzistas toleremo fare de au^toritatoĵ rilate al la kontrau^leĝaj^oj en temo de asbesto?**

**13) Ĉu ekzistas (en via Lando) sociaĵ au^ laboristaj organizacioĵ kiuj antaue^nigas konadon pri tiuj ĉi temoj?**

**14) Ĉu vi scias, ĉu asbesto alestas en via hejmo, au^ en iu loko, kie vi log^as au^ laboras?**

**Ni kore dankas vin pro via kunlaborado.**

**Daniele Agostini (Bolonja Esperanto Grupo)**

## **AVE- Asocio de Verdaj Esperantistoj Bondeziroj por Belaj Festotagoj kaj Bona Nova Jaro !**

Kara ge-amiko,

Kion deziri por la venonta jaro ?

Unue pacajn kaj harmoniajn festotagojn t.n. Sanktaj Noktoj kaj Kristnasko.

En la norda hemisfero, la Sanktaj Noktoj ja cxiam estis tempo de festo(j) - cxar ek de tiam la tagoj plilongigxas. Kaj sendepende de la religio, estis tempo por iomete redukti la eksteran laboron kaj pensi pri si - kaj la familianoj - mem.

Mi ne scias, cxu en la suda hemisfero okazis simila festo en la alia tempo (Junio).

Mi deziras por ni cxiu:

Pacon !

(inter Israelo kaj Palestino),

(en la Irako),

(en Sudano/Darfur, kie nun okazas simila afero kiel priskribita en la biblio, kiam Kain (la nomado, cxasisto) mortigis sian fraton Abel (la kamparano); arhxaika afero, sed en la modernaj tempoj oni devus trovi pli pacajn eblecojn solvi la problemon (tro granda brutaro, manko da akvo, demografia problemo).

Sanon !

(en multaj landoj kie ankoraux kusxas minoj kiuj malebligas la agrikulturon kaj detruas aux kripligas multajn homojn kaj bestojn - anstataux produkti, vendi kaj acxeti tiajn minojn, necesas produkti mino-formeto kirasitajn masxinojn),

Ofte malsano okazas pro la malricxeco (tuberkulozo), registantaj homoj devas rezigni la propran ricxigon sur-kostoj de la civitanoj, kaj fari legxojn por ke aliaj ricxuloj donu parton de la ricxeco al la sxtato (korupcio estas sxtelado).

Respekto de la Homaj kaj Bestaj Rajtoj !

Lando kie la homoj ne povas esprimi sin libere - se homoj tiel endangxerigas sian vivon - estas malliberejo.

Tiuj kiuj lasas mortigi jxurnalistojn, cxar ili publikigas problemojn, estas fi-homoj.

Tiuj kiuj soifas je la mortpuno estas krueluloj - mem ne pli bone ol la krimuloj.

Tiuj kiuj praktikas aux favoras la mortpunon malgraux la problemo ke jam ofte oni ekzekutis (kaj ekzekutos) sen-kulpulojn estas mem krimuloj.

Tiuj kiuj praktikas la mortpunon por poste vendi la organojn de la ekzekutitaj, estas monavidaj hom-bucxistoj.  
Mi esperas, ke la civitanoj fortigxu kontraux tiaj ne-respektemaj homoj kaj organizajxoj.

Prudentecon !

La libro "Kolapso" de Jared Diamond montras bone kiamaniere ni pripensu nian vivon, kiamaniere ni kiel civitanoj kaj politikistoj administru nian terenon kaj la resursojn.

Respekti la ekologion (la bazajn mediajn legxojn), kaj la najbarojn (fremdaj landoj) gravas; esti memstara je la plej gravaj resursoj ankaux gravas - alimaniere sekvas servuteco kaj malstabileco.

Gxojon !

Ke ni vivas.

Bondezirojn, ke espereble sufixe bone, sane, pace, respektite, prudente.

En tiu cxi direkto ankaux AVE dauxrigas sian vojon.

## **Mondetur informas**

From: info@mondetur.net

Nia Novjara prezento

Fino de ĉiu jaro estas tempo kiam ni ĉiuj provas memorigi faritan dum pasintaj dekdu monatoj de sia vivo dum ĝuste finataj 365 tagoj, kalkulas kion ni faris bonan kaj kio restas por la sekvonta jaro. Nu dum la lastaj tagoj laŭ la kristana religio, parto kiu uzas julian kalendaron, venas ankaŭ la tago de kristnaska celebros dudekkvina de decembro. Tago kiam, laŭ religia kredo, Jezuo Kristo alvenis Mondon por alporti pacon. Okaze de tiu tago, krom kristanoj, multaj ne religiuloj donacas unu al alia pli aŭ malpli modestan donacon. Donacon por montri kiom multe ni aprecas niajn proksimulojn. Ni geesperantistoj faras la samon.

Nia kompanio estas tre modesta kaj pro tio ne eblas donaci al vi ion grandan. Longe ni pensis kio MondEtur Esperanto kompanio por zorgado kaj servado Patajo Tajlando povas prezenti al vi kiel signo de nia aparteno al rondo esperantista kaj jen ni ofertas al vi nian turisman programon:

**SUR LA ŜPUROJ DE TAJAJ REĜOJ.**

Por ke tio estu vera donaco ni faris ĉion ke vi havu kaj ĝuu la programon de multegaj de vi akcepteblan. Espereble vi volonte ricevos kaj uzos proponaĵon. La programon vi trovos je:

<http://www.mondetur.net/tajlando.htm>

Stabo de MondEtur deziras al vi, kiuj festas tion ambaŭ kristankalendare, agrablan, ĝojegan Kristnaskon kaj dum la 2007-a jaro ĉion la plej bonan en via privata, ofica kaj esperanta vivo! Multe da sukceso, feliĉo, kontenteco, sano dum la sekva jaro deziras al vi

Deng, Zoran kaj Želimir

La 31a IJF en Friulo-Venecio Julia de la 5a ghis la 10a de aprilo 2007  
En Lignano Sabbiadoro, che Adriatika maro, oni solene festos la 120  
jarojn de Esperanto

### **31a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO**

**"120 jaroj de Esperanto: 120 jaroj da interkomprenigo kaj paco"**

Nia Festivalo estas unu el la plej ŝatataj junularaj renkontigoj en la tuta Eŭropo. Oni spiras la specialan esperantan boneteson, miksajho de amikemo, ghuado, malsameco-respekto. Partoprenas kaj fluparolantoj kaj komencantoj, kaj vi ege facile amikumos kun geitaloj kaj eksterlandanoj.

Oni povas partopreni kiel plenkotizanto au memzorganto. Helpe de vi ni faciligos al la partoprenantoj vojaghi eksterlanden: informighu che la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de via ŝtato pri la protokoloj kaj kontaktu nin.

Chiu-jare IEJ elektas temon por la Festivalo, pri kiu oni prelegas, diskutondas, laborgrupas. La distra programo trakteblas en la nokta universitato. Dumtage oni povas elekti kursojn pri dancado, memdefendo, ktp. Okazos kursoj pri la itala kaj pri esperanto, por komencantoj kaj progresintoj. Dum la vespera programo ofte okazas: koncerto, teatraĵho, internacia vespero, dumnokta promenado en la urbo, ktp. Funkcias dum la tuta nokto la trinkejo, la dancejo kaj la gufujo. Helpe de la lokaj komunumestroj, ni klopodas vidigi la belajhojn de la chirkauajho. Kutime oni eskursas duontagon. Kiel konate, nenio farendas dum la festivalo: chiu mem decidas kiamaniere (mal)shpari sian tempon!  
:-D

Alighu rekte: <<http://iej.esperanto.it/ijf/2007>> au skribu al <[ijf.admin@esperanto.it](mailto:ijf.admin@esperanto.it)> por kromaj informoj.

Nicola Ruggiero  
IJF-administranto  
[ijf.admin@esperanto.it](mailto:ijf.admin@esperanto.it)

## **En Pisa la 74a Itala Kongreso de Esperanto**

Francesco Amerio [f.amerio@libero.it](mailto:f.amerio@libero.it)

### **Europo: multaj lingvoj por komuna lando**

Pisa, 2007.09.01-06

La temo de la Kongreso estas Europo, verŝajne la lando en la mondo kun pli da oficialaj lingvoj (21). Tie ĉi, en la lulilo de la okcidenta kulturo, Esperanto povus roli jam de nun sian komprenigan, interkonigan kaj pacinstigan rolon. Krom la diskuto pri la Kongresa temo, estas planataj ampleksaj seminarioj, kiuj kovros la plej diversajn interesojn de la partoprenantoj. La organiza parto de la kongreso (inauguro, asocia asembleo, voĉdonoj de la federaciaj organoj) estos koncentrita inter sabato kaj dimanĉo, dum lundo kaj mardo estos rezervitaj por la menciitaj seminarioj. La kongreso aparte celos renkonton inter la esperantistoj kaj la urbo, tial oni planas samtempe kun la kongreso prezenti plurajn ekspoziciojn pri Esperanto kaj pri la lingva problemo tra la urbo. Krome, en la vesperoj oni planas organizi spektaklojn, malfermitajn al la tuta urbo. Pli detalajn informojn oni trovos regule en la retpagharo [www.esperanto.it/html/fej/kongreso.htm](http://www.esperanto.it/html/fej/kongreso.htm)

Itala Esperanto-Federacio <[fej@esperanto.it](mailto:fej@esperanto.it)>, Itala Esperantista Junularo - <[iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it)> via Villorresi, 38 I-20143 Milano - Tel+fax +39 02 58100857 <http://www.esperanto.it>

### **Tago de la patrina lingvo**

### **Alvoko de Zlatko Zilvar**

NI INVITAS NIAJN LANDAJN ASOCIOJN PARTOPRENI EN KAMPANJO OKAZE DE TAGO DE GEPATRAJ LINGVOJ



Oficiala tago de gepatraj lingvoj estas la 21-a de februaro. EEU-estraro metis en sian taskaron stimuli laŭeble vastan kampanjon al Eŭropaj politikistoj kaj instruaj institucioj okaze de tiu ĉi tago kaj septembra Tago de eŭropaj lingvoj. Tial ni invitas landajn asociojn laŭeble partopreni en jenaj agadoj:

1. Deprenu de la ttt-paĝo <http://uea.org/informado/gepatralingvotago.html> de UEA la ekzistantan grafikan solvon de afiŝo en via lingvo. Se ĝi ankoraŭ ne estas tradukita, urĝe traduku al via(j) nacia(j) lingvo(j) kaj multobligu laŭbezone kaj laŭpove en necesa grandeco kaj kvanto.

1. Sendu la afiŝon al vialandaj EU-parlamentanoj laŭ via decido: aŭ al ĉiu aŭ al tiuj kun kiuj vi jam havis pozitivajn rilatojn .
2. Sendu la afiŝon kaj bondeziru al diversaj enlandaj institucioj, kiujn vi taksas por ili en tiu ĉi momento gravaj, ekz. al ministroj pri edukado, al edukinstitutoj, eventuale al kelkaj lernejoj, al edukaj televidkanaloj ktp
3. Se vi tradukis al nova lingvo, nun ne ekzistanta en la UEA-arkivo, bonvolu sendi ĝin al <http://us.f301.mail.yahoo.com/ym/Compose?To=afihoj@lot49.de> por ke la taskigito de UEA adaptu la tekston al la afiŝa formo kaj UEA aperigos ankaŭ ĝin sur sia paĝo.

Aldonu en akompana letereto vian adreson kaj vian ttt-paĝon.

EEU-estraro siaflanke

1. sendos la afiŝon al ĉiuj Komisionanoj de Eŭropa Komisiono en ilia lingvo,
2. stimulos partopreni en kampanjo laŭeble multajn asociojn kaj aktivulojn per ĉiuj eblaj atingeblaj elektronikaj vojoj.

Zlatko Tišljarić, sekretario de EEU

**El la leteroj**



Agrablan kaj ghojplenan pasigon de Kristnasko-festoj

kaj en la nova jaro 2007 multe da sano, felicho, prospero kaj precipe Dia beno deziras al vi kaj viaj familianoj

via amiko Milan Neubeler kun edzino

Agrablan kaj ghojplenan pasigon de Kristnasko-festoj

*Ni varme recipokas la bondezirojn kaj vastigas ilin al la aliaj ricevantoj.*

*amike, Albana Esperanto-Instituto*

Serenan Kristnaskon, Sanon kaj Pacon  
en la Nova 2007a Jaro deziras al Vi  
tutkore  
Elda kaj Pino

Trieste Italio

[terezesp@eunet.yu](mailto:terezesp@eunet.yu)

EN SERBA: SRETNA NOVA GODINA ( tio mankis sur la listo)  
de Tereza

**ĜOJAN KRISTNASKON ! - FELIĈAN NOVJARON !**

**Novum Annum Prosperum**

**Bonne Année  
Gelukkig Nieuwjaar  
Glückliches Neues Jahr  
Buon Anno  
Happy New Year  
Feliz Año Nuevo  
Godt Nyttår  
Ano Novo Feliz  
Gott Nyttår  
Onnellista Uutta Vuotta  
Bliain Nua Faoi Mhaise  
E Glécklecht Neit Jöer**

**En la Albana:**

**Gezuar KRISHTLINDJET  
dhe  
Vitin e Ri 2007**

**Ju uroj nga zemra Shendet, Lumturi  
e Suksese per shume vjet**

**Merry Christmas and Happy New  
Year 2007**

- dankon pro la gazeto. chu vi povas respondi je mia demando: kiel prononci la nomon de via chefurbo: [tirane] au [tirana] kaj kiel ghuste skribi la nomon de la urbo?

Dankon,  
Doron

- 

Dankon, samideano, vi faras bonan laboron por Esperanto, kiu vere estas inda afero. Mi nur bedauros, ke provizore mi ne povas aperigi alfiksajhojn pere de chi tiu mia rp-adreso. Pri iu ajn estonta mesagho, eble ankau pri

la nuna, bonvole uzu mian alian rp-adreson: <[abumalik@btinternet.com](mailto:abumalik@btinternet.com)>  
Antaŭdankon kaj saluton al chiuj gesamideanoj. Samideane, Husejn Al-Amily

- esperanto-instituto
- Saluton! Zsuzsanna Ágnes Berényi
- bonvolu forigi min de via adreslisto.
- Dankon  
Frank Huber

## **Rakontoj**

### **Albana poezio Trakukaĵoj el la albana al Esperanto**

Rahman Dedaj  
(Rahman Dedaj)  
(1939- )

#### **I N F A N A Ĝ O**

1.

Fluas akvo kaj nenion al vi parolas, bubo,  
kaj vi belskribas nomon vian en sablo...  
Vidu ja – ondo ludon ŝtelas,  
fuĝas kaj al vi nur murmuron lasas!

-Sciu: songoj ankaŭ tiel pasas,  
restigante du larmojn en okulo...

Akvo silente fluas  
kaj ŝtelas infanaĝojn  
al buboj nudpiedaj, ludantaj rivere...

2.

Furioze li ĝin postpelis  
ĉirkaŭ la fosto draŝeja –  
ĉevalon blankan...

(Sur la draŝejo garboj elspiradis...)

Unu tagon – ĉeval' malaperis  
kaj post ĝin la bubo  
en koron montaran...

Unu tagon, denove –

Ankaŭ de tie ĉeval' foriĝis  
kaj jen li post ĝin...

Nenion ili kun si forportis  
krom nomon kaj kolhararon blankan.

Esperantigis  
**Boris'a Milic'evic'**

Noto: la redakcio dankas elkore samideanon Boris'a Milic'evic' kiu ankaux alifoje kontribuis per tradukajxoj el la albana.

**Gezim Ĉela<sup>1</sup>**

### **La vero pri la usonarmeaj aviadilo "kaptita" en Albanio**

Je la fino de la jaro 1957, la ĉefa dromo de la konstruota aeroporto de Tirana<sup>2</sup>, post kelkaj jaroj da teda kaj peniga laboro, estis finkonstruita. Oni ne eligis plu nin en la laboron. La tendaro estis ĉirkauxita per matoj kaj pikdratoj por ke la eksteruloj ne povu envidi la prizonulojn. Ankaux la gardistoj sur la gardoturoj ekservis malsupre. Unuafoje ni ekgxoĵis plilongigitan ripozon. Je fruoktobro alteriĝis tie la unua aviadilo "Tupolev"<sup>3</sup> per kio komenciĝis la portempa funkciado de la dromo. "TU" alvenigis je oficiala vizito la tiaman ministron pri defendo de Sovetunio, Jxukov, kaj la faman aviadil-konstruiston Tupolev. Okazis solenaj akceptoj kaj honorigoj fare de la albana registaro kaj komunista gvidantaro. Post kelkaj tagoj, la gastoj revenis hejmen kune kun la aviadilo "TU". Je ironio, post vizito al Albanio Jxukov estis depostenigita de Hxruscxev<sup>4</sup>.

Tuj poste finiĝis ankaux nia ripozo. Ni rekomencis la laboron. Oni demetis la matojn kiuj kasxis la tendaron. Nin atendis grandega kaj peniga laboro por betonigi la flankajn vojojn, restadlokojn kaj la terminalon. Alta monto je sxtonetaro troviĝis en la orienta rando, apud la dromo kaj la tendaro, portenda al la alia rando. La transporto estiĝis per vagonetoj sur reloj, kiujn ni plenigis per sxoveliloj kaj pusxis per brakoj, je 34 vagonetoj po tage.

Iutage, dum ni estis laborante kiel terformikoj sur la dromo, auxdigxis surdiga bruo de jxetaviadilo, aldirektita al nia dromo. Je nia miro, gxi estis alproksimiĝante terure al ni. Sed per akrobata devojigxo gxi preventis la kunfrapiĝon al alta gardoturo jxus meze de dromo kie staris armita soldato, transpasis tute malalte super la unuan relvicon, kie cirkulis la vagonetoj, kaj antaux ol kunfrapiĝu al la dua relvico, post kiam la radoj estis jam ektusxintaj la dromon, devojigxis je 90 gradusoj kaj haltis.

Ni rigidigxis gapante kaj sxokite. Ne estis klara al ni kio estis okazanta, kion volis tiu aviadilo cxe ni, kiu ecx endangxerigis homvivojn.

---

<sup>1</sup> Eksa politika prizonulo dum dudek jaroj en la totalisma regimo. La rakonto estas auxtentika. Kiel cxiuj prizonuloj ankaux Gezim laboris devige en multaj objektoj industriaj, minejoj, ecx en la aeroporto de Tirana

<sup>2</sup> Ĉxefurbo de Albanio

<sup>3</sup> Nomo de fama sovetunia aviadilkonstruisto

<sup>4</sup> Eksa Unua Sekretario de la Komunista Partio de Sovetunio.

Tuj, je direkto de aviadilo, alpasxis la dejxoranta oficiro, kiu atinginte gxin, ekvidis altstaturan piloton elirante el lia pilotejo. La oficiro demandis lin lauxtvoce:

-Kiu vi estas?

-I am american!<sup>5</sup> - respondis angle la piloto.

La oficiro ekauxdinte la vorton “usonano”, ege rabiigite returnigxis kaj ekkriegis:

-Subite donu al mi auxtomatikon! Rapide auxtomatikon!

Sed liaj kriegoj estis senvaloraj, cxar la armiloj estis ekster la cxirkauxajo de la tendaro. La oficiro ekkuris je direkto de komandejo. La usonano plusidis sur sia segxo surprizigite kaj ne komprenante kio estis okazanta. Dum ni, iom post iom, ekkomprenis ke la aviadilo estis usona, cxar sur la korpuso kaj subflugile gxi portis la blankan stelon kaj je flankoj du strioj, dum sur antauxa parto klare distingigxis la literoj “USAIR FORCE”.<sup>6</sup>

Peza silento envolvis nian medion, estis gxi ia sento de gxoyo, fierumanta nin, kial ne, ankaux ia espero, ekvidante la blankan stelon. La dejxorantaj policistoj iris kaj revenis konfuzitaj, ne sciante kion fari, atendante ordonon desupre, kiu ja venis de komandejo:

-Cxiuj prizonuloj forigxu de la dromo.

La policistoj ekfajfis forte, signalante ke ni lasu la laboron kaj envicigxu po du, cxar tiamaniere oni nombrumis nin. Oni enigis nin haste en la tendaron kaj plifortigis la gardistaron.

La tendarestro, Beqir Bala, akompanata de vico de oficiroj kaj policistoj aldirektigxis al la dromo, por ke ekkonu la situacion. Oni alvokis ingxeniron Zama (prizonulo) kiel interpretiston. La usonano komencis ekspliki kiu li estis kaj kial li trovigxis tie. Tuj poste oni kondukis lin al la komandejo. Post du-tri horoj aperis je la antauxa parto de la dromo du veturiloj de la Ministrejo pri Internaj Aferoj kaj aldirektigxis al la komandejo.

Post iome, kune kun la piloto, ili forigxis je direkto de Tirana. Posttagmeze, kelkaj albanaj pilotoj komencis kontroladi detale la aviadilon, sed la pilotejon ili ne sukcesis malfermi. (tion ili faris la morgauxon, kune kun la usona piloto). Reveninte, ingxeniro Hasan Zama, cxirkauxigxis de ni cxiuj kaj estis bombardata de niaj demandoj por eklerni tion kion estis okazinta.

Kio estis okazinta? La aviadilo ekflugis de Italio al Grekio, sed dumvoje gxin trafis paneo kaj gxi estis devigita alterigxi gxuste en Rinas<sup>7</sup>. Versxajne la piloto estis lerninta ke la aeroporto funkcias, ekde la alterigxo de “Tupolev”.

Oni diris poste ke la piloto forlasis Albanion, dum la aviadilo plurestis sur la dromo, malhelpante tiel la dauxrigadon de laborajxoj. La tendarestro alvenis cxe nin kaj diris humure:

-Venu, malamikoj kaj pusxu la aviadilon vian. Estas gxi donacajxo de Usono por vi!

Ni pusxis la aviadilon tra la kampo de Rinas gxis finfine, post kelkaj jaroj da restado tie, oni transportis gxin al la muzeo de armiloj en la suda urbo de Gjirokaster kiel militakirajxo kaj venkosigno de nia aviadilaro kontraux la usonan imperiisman kaj NATO-n.

## **Enesperantigis Bardhyl Selimi**

---

<sup>5</sup> Mi estas usonano

<sup>6</sup> Aerfortoj de Usono

<sup>7</sup> Loko je 25 km for de Tiana ke estas la aeroporto, kiu nomigxas hodiaux “Aeroporto Patrino Tereza”.

## **Ismail Kadare**

### **La morto de la rusa virino<sup>8</sup>**

Nina F., el Moskvo. Edzinigita al albana oficiro en la jaro 1959. Post la vortoj : Ja ljublu vas! (Mi amas vin!), sekvis la promenadoj en la parko Gorkij, la telefonadoj el la telefonbudoj kovritaj je negxo, la promesoj “vi ne forgesos min, cxu ne”..ktp.ktp. gxis la momento kiam oni petis sxin: cxu vi, civitanino Nina F. akceptas A.D kiel edzon, kaj poste la signoj, intersxangxo de fingringoj, alveno en Albanion kaj la miela monato tie.

Nun sxi kusxas en la cxerko meze de la cxambro de la apartamento, miloj da kilometroj for de sia lando. Jam pasis jaroj ekde sxi ne ricevis leterojn el siaj proksimuloj (la leteroj ja estis tre raraj post la rompigo de interrilatoj, dum lastajn jarojn ili preskaux cxesis). Sxi ne estas sciinta ekzakte kiu estas mortinta kaj kiu ankoraux vivas en sia familio, samkiel ankaux ili ne ekscios ekzakte neniam cxu sxi envere mortis jam, des malpli sian mortojaron.

Cxirkaux la cxerko aro da virinoj priploras sxin en fremda lingvo. Estas ili la fratinoj de la oficiro, jam maljunigintaj. Pro la kaptuko kun floroj sur ties kapon, sxi similas pli al rusinoj kaj tio plue igas pli trista la ploradon en fremda lingvo.

Malofte virino estis priplorata de siaj bofratinoj tiel malgxojege. Tiu penso kvankam ne diratas vocxe, sentigxas tuje. Tiel kiel oni sentas la eksplikon pri gxi: oni priploras unuavice sxian solecon. Kaj certe ankaux la sian.

Dekstre de la cxerko, post la dorso de virinoj staras librosxrango. Inter la titoloj okulfrapas la libroj temantaj la rompigon kun Sovetunio, cxefe la politikaj libroj de la landa gvidanto. Inter ili kaj la rusa virino kusxanta en la cxerko estas la plorego de la virinoj.

La horo de entombigo proksimigxas. La movigo en apartamento farigxas pli densa, oni alportas la cxerkokovrilon, tondras la najloj fiksantaj gxin. Post iome la busoj kun funebraj homoj veturas al la okcidenta tombejo de la urbo.

Estas humida, pluva tago. Tamen neniuj forlasas la tombejon antauxtempe. Unu virino, membro de prezidantaro de Fronto de dombloko elparolas koncize, dirante ke Nina F. estis bona patrino kaj edzino, samkiel diligenta laboranto, kiu prikonsideris en sia laboro cxiamtempe la instruojn de Partio kaj ties gvidanto.

Nenion pri sxia nacieco, tiun naciecon kiu estis doninta al sxi plej grandan solecon imageblan.

Adiaux, Nina!

Cxi tiuj estas la solaj naturaj vortoj eldiritaj de la membro de prezidantaro de Fronto.

Sed pli natura ol ili estas ja la bruo de la koto kaj sxtonetoj falantaj sur la cxerkon, je universala lingvo, multe pli kompreneblaj ol tiuj de la homoj, kvankam la tombon por la

---

<sup>8</sup> Dum la 15 jaroj da amikeco kun Sovetunio (1945-1960) miloj da albanaj gejunuloj estis senditaj al Sovetio ankaux por studado. Parto el ili ecx geedzigxis al tieaj knabinoj, kiuj estis gxenerale tre kleraj kaj specialistinoj en diversaj kampoj. Sed post malamikigo kun granda socialista lando, la regximo de Enver Hoxha en Albanio persekvadis la soverianinojn diversmaniere. Multaj el cxi tiuj ecx enprizonigxis, internigxis, dum la aliaj estis forpelitaj de la lando. Nur tre malmulte el ili plurestis. La rakonto verkita en la jaro 1985 (kvin jaroj antaux la ekfaligo de la totalisma regximo en Abanio) temas pri la morto de rusino edzinigita al albano.

mortinta virino donas ne la vasta rusa tero, sed la malvasta albana grundo, kiu apenaux sufixas por la tomboj de propraj landanoj.

## **Enesperantigis Bardhyl Selimi**

### **Sufismoj el Pakistano**

*Karaj amikoj,*

*Pakistano estas tre ric'a en sufismo. En chiu provinco kaj chiu lingvo de Pakistano oni povas trovi multan sufisman literaturon. Antau kelkaj monatoj mi tradukis mian unu libron en esperanto kaj publikis ghin. Jen estas kelkaj ekzempleroj el tiu chi libro. Legante ilin vi povas imagi pri la Sufismaj pensoj de Varis Shah (1722-1792), la granda Sufia poeto de Pung'abo, kiu skribis en la pung'aba lingvo ( la livgvo da parolantoj pli ol 120 milionoj). Jen estas kelkaj versoj tradukitaj en Esperanto:*

1. Ho Varis Shah, estas skribita en la nobla korano, ke **kiel vi semos tiel vi rikoltos.**
2. Ho Varis! **Tiuj, kiuj faras bonajn agajn, havos eternan vivon.**
3. Ho Varis! Chiu homoj naskig'as senkulpaj, nur iliaj malbonaj agoj alportas malhonoron al ili.
4. Ho Varis! Ne estas savo por vi se vi ne faros bonajn agojn ec' se vi estas la filo de iu nobla homo.
5. Ho Varis! Kiel oni povas vivi pace kaj trankvile, detruante aliajn kiuj vivas felic'e?
6. Ho Varis! Se vi havas Dian benon, tiam la steloj de fortuna (zodiakaj steloj) movig'as al via direkto.
7. Ho Varis! **Se vi venkas per repacigo, vi ne bezonas militi.**
8. Ho Varis Shah! Kas'u niajn plezurojn de publiko ec' se ni festenas per nia jutraj'o au' per peco de kruda sukero.
9. Ho Varis! Havu la honoron proponi helpnan manon kaj prenu vian dependanton trans la rivereton. ( Se vi decidu helpi iun homon, helpu lin g'is la fino de la laboro, kompleta helpo).
10. Ho Varis! **La najtingaloj, kiuj kurag'e flugas kun agloj, lacas kaj mortas. Kaj tiuj cervinoj, kiuj kurag'as trinki akvon de la akv-rezervujo de la leonoj, perdas siajn vivojn.**

*Se vi informos min pri via opinio, mi sendos al vi plurajn ideojn de diversaj sufioj.  
Via sincere, Saeed*

Vi povas viziti mian retejon: [www.sufiwisdom.org](http://www.sufiwisdom.org)

Lessing said, "The aim of knowledge is Truth and Truth is a need of the soul."



Saeed Ahmad C/O **Adnan Books**, Dubai Plaza, 6th Road Chowk, Rawalpindi, Punjab, Pakistan. PH: 051-4417813 mobile # 0300-5234006

## El nia historio

**Jon Halliday**

**The artful Albanian**

**Chatto Windus Ltd. Londër 1986**

Britoj tentis trifoje surterigi en Albanion de la maro dum la dua duono de 1944 (en Spile de Himara, en Saranda kaj Tirana). Usonanoj kompilis planon aŭguste 1944 por venigi Albanion ĉirkaŭ 5000 trupoj. Ĉio estis planita por malhelpi la malvastan integriĝon de la partizana movado kun jugoslavo de Tito kaj rusoj. Usono kaj Britio intencis interveni por kontroli la politikan situacion en Albanio, por altrudi la dividon de la ŝtatpotenco inter diversaj politikaj partioj enlande.

Postmilite en Tirana alvenis militistaj misioj de usonanoj, britoj kaj jugoslavo.

La interrilatoj de Enver Hoxha kun Okcidento malboniĝis pro pluraj kialoj sed plej gravaj estis tiu de demokratiaj ĝeneralaj balotoj kaj interkonsentoj de antaŭmilitaj registaroj kun eksterlando. La tragika incidento en Kanalo de Korfu en la jaro 1946, kiam unu el militŝipoj britaj estis trafita de marminoj kaj detruita, notis la finon al la diplomaciaj rilatoj kun Usono kaj Britio.

Aliflanke Albanio plifortigis siajn rilatojn kun Jugoslavio (ĝis la jaro 1948) kaj Sovetunio.

Enver Hoxha renkontiĝis kvinfoje kun Stalin kaj poste kun ties posteuloj. Ĥruŝĉev vizitis Albanion ĉekape de granda delegitaro somere 1959 kaj planis transformi la landon en grandan milibazon.

Sed Enver Hoxha kaj lia kolegaro faris plejeblon por konservi propran totalisman regadon kaj en la momento kiam iliaj postenoj estis minacataj de jugoslavo aŭ sovetianoj ili malamikiĝis. Kun Okcidento ili neniel povis rilati ĉar tio signifus agnoskon de demokratieco kaj sekve sian deposteniĝon. Tial Albanio elirinta defakte de Traktato de Varsovio en la jaro 1961 perdis la ŝancon aliĝi al Okcidento, sekve seniĝis je progreso kaj prospero.

Ankaŭ kun ĉinoj Enver Hoxha malamikiĝis en la jaro 1978, pro samaj kialoj (tiutempe Ĉinio sekvis ekonomian politikon pli liberalan kaj proksimiĝis al Usono. (en la jaro 1971 Nikson vizitis Ĉinion)

Enver Hoxha estas la gvidanto restinta en la posteno pli longe ol kiu ajn diktatoro enmonde, escepte ni diru, de japana heredanta imperiestro. Li konservis la ŝtatpotencon kunfrontiĝante al tri grandaj defioj: genta balkana intrigo, subversio, anglo-usonaj intervenoj kaj komplotoj de Kremlo. Lia vojo por kapti kaj teni la potencon pleniĝis per kadavroj de siaj malnovaj kaj novaj malamikoj. Neniu alia komunisma reĝimo ne spertis tiajn kontinuajn purigojn kaj murdojn kiel ja la albana reĝimo.

## Ni kondolencas

### **Je memoro al samideano Maurice Sujet**

En "La Gazeto", numero 128, 31 jan 2007, oni informas sur pagxo 34: Maurice Sujet mortis sola je agxo 86 jara, je 5an de dec. 2006." La Gazeto dedikas aldone plurajn fotojn el la vivo kaj agado de tiu granda esperantisto.

Por mi Maurice estas same tre kara. Mi renkontis lin somere 1998 en Trieste okaze de tiujara OSIEK-konferenco. Maurice invitis min tagmangxi en restoracio bela apud la maro regalante min per itala pizza kaj biero. Dume ni interbabilis varme kaj amike. Mi eksciis ke li estis antaux pensiigxo, lernejestro kaj instruis fizikon. Plue li rakontis al mi sian vivon, el kiu mi memoras ke estante 12 jara lin trafis la nazia okupacio de sia patrio kaj familie li devis rifugxi piedmarsxante suden de la lando. Tamen oni lin kaptis kaj devigis labori en germanaj fabrikoj longan tempon.

Mi memoras ankoraux lian dolcxan kaj sinceran rakontmanieron, same la modestecon de vera civitano. Longe poste ni dauxrigis nian korespondon, krom periodoj kiam li fojfoje enlitigxis en hospitalo pro malsanoj trafintaj lian maljunigxintan korpon.

Amiko Maurice, same kiel pluraj aliaj miaj francaj konatuloj el Esperanta komunumo, pligrandigis mian estimon kaj konsideron pri tiu nobla kaj kuragxa popolo de Francio.

**Bardhyl Selimi**

### **Prelegoj**

## **Historio de Aleksandro Moisiu, granda albana dramaktoro en unuaj jardekoj de XX jc**

Eŭropa historio valorigenda: Alessandro MOISSI / Aleksander MOISIU :  
plurcivitaneca kaj plurŝtataneca homo

Aŭtoritatuloj, Gesinjoroj,

Ĉar neniun entreprenon/institucion mi reprezentas, pli bonas ke mi prezentu min al vi: mi estas privata esploristo, pasie ekstudinta la albanan historion, post restado, en ĉi tiu Lando, kiel militisto – Mara Oficiro - dum preskaŭ trijaraj servadperiodoj.

Antaŭ kelka tempo, dum miaj serĉadoj, mi ekinteresiĝis pri la personeco de Alessandro MOISSI / Aleksander MOISIU, teatra aktoro (sed ankaŭ kina) albandevena, tre fama kaj populara en Centra Eŭropo, en la unuaj jardekoj de 1900<sup>a</sup> jaro. Ne estante artkritikisto, mi klopodis pliprofundigi miajn konojn pri malgranda detalo, sed ege grava, kiu ofte restis senresponda kaj malpreciza, en diversaj fontoj kie Moissi estis citita, nome ties naskiĝloko, foje indikita en Durazzo, foje en Triesto.

Certe, la fakto ke mi mem estas triestano, ludis sian rolon en ĉi traserĉado, tamen ne pro simpla "parohismo", sed pro tio ke la tuta esplorado estis pli simpligita: mi elserĉis la bezonatajn informojn en la komunumaj registroj kaj en tiuj, eĉ pli

fidindaj, konsidere la historia periodo prikonsiderita (1879) baptoj, de la Greko-Ortodoksa Preĝejo Sankta Nikolao kaj Sanktega Triunuo en Triesto, kie mi trovis la pruvon, nekontesteban kaj definitivon, ke li naskiĝis en Triesto.

Sed tiun ĉi mian serĉadon, kies parto estis jam publikigita antaŭ kelkaj monatoj en iuj albanaj periodaĵoj (unu en informadika kaj la alia en papera formoj) plej probable mi povos prezenti per prelego en la marta monato, eble pli oportune en Durazzo, tial, se iu deziras scii ion pli, jam ekde nun li/ŝi estas invitita, kun ebleco diskonatigi kaj la lokon kaj la daton.

Certigita la vereco de la esence persona dateno, MOISSI/MOISIU sendube povas esti definita homo ne nur havanta plurajn civitanecojn, aferon kiu foje normalas ĉe personoj vivintaj en la Dudeka Jarcento kaj en tiu nia Eŭropa parto (miaj gepatroj ekzemple havis eĉ 5, mi mem nur tri!), sed ankaŭ – kaj jen kio plej esceptas! – plurajn naciecojn. Albandevena laŭflanke de la patro, itala sub Aŭstria regado laŭflanke de la patrino (siavice probable arbëreshë laŭflanke de la patro kaj eble slovena laŭflanke de la patrino), poste, dum la tuta periodo plej signifoplena de sia ekzistado (kaj profesia kaj amsenta), germanlingvulo, sed en la sentoj plej profunde itala, tamen neniam naciisma!

Laŭ mia tre modesta opinio, tre interesa personeco elstariĝas, trans la arta medio, ĝuste por ni, kaj italoj kaj albanoj, kiuj, kun ioma streĉo, sin preparas iĝi eŭropanoj.

Jen la rezultoj de miaj personaj esploroj.

Mi povas aldoni, ke rilate al Moissi/Moisiu ŝajnas ke en Albanio oni lin kvazaŭ ree malkovris, aŭ pli bone dirite, plivalorigis: ĉi-jare oni titolis la novan Universitaton de Durazzo per lia nomo, kaj poste oni ne povas ignori la parenca ligo, inter li kaj la aktuala Respublika Prezidento Alfred MOISIU, kiu estus lia kuzo je tria parenco-grado.

Sed ankoraŭ io aldonendas: mi, unue triestano kaj nur poste esploristo kaj amanto de albanaj historiaĵoj, ankoraŭ nun bone rememoras la grandan sukceson ricevitan en Triesto de ampleksa ekspozicio pri MOISSI, starigita de la Urba Teatra Museo "Carl Schmidl", en 1986, nome precize antaŭ 20 jaroj. Efektive la ekspozicio naskiĝis el iu ero de tiu kiu estis muntita en Vieno, zorge de la *Österreichische Nationalbibliothek-Theatersammlung*, jaron antaŭe okaze de la morto-datreveno de MOISSI, okazinta ĝuste en Vieno.

Kiel plurfoje al mi konfidis la Direktoro de Urbaj Muzeoj en Triesto, (al kiuj apartenas ankaŭ la Teatra Museo "Carl Schmidl", posedanto de ĉiuj trovitaĵoj pri MOISSI), profesoro Adriano DUGULIN, kiu – interalie taskigis min alporti ĉi tie siajn personajn salutojn, kaj sekve tiujn de la Urbaj Muzeoj en Triesto,

longatempe revis porti la ekspozicion al Albanio, eĉ tagon post ties fermo, sekvante muzean kaj historian itineron, sed ankaŭ, eble pli simple, tiun spuritan de la vivo de tiu homo kun lia familio. Nome, forirante de Vieno, kie li mortis, trairante Trieston, kie li naskiĝis, pro la kialo ke ĉi tiuj du lokoj simbolas la teritoriojn kie alten leviĝis lia arta vivo, por poste albordiĝi (kaj do reveno al propraj originoj) ĉi tie en Albanio, kaj pli precize en Durazzo, devenloko de la patro (malgraŭ ke la familio probable originas de Kavaja), kaj ankaŭ la loko kie MOISSI pasigis sian infanaĝon kaj ricevis elementlernejan instruadon.

Kiel dirite je la komenco, mi ne estas spertulo pri muzeoj, do tute ne scias, ĉu vere ĉi tiu "itineron" poas esti konsiderata "muzea", sed tutcerte jes, ĝi estas "vivovojo"

Nu, oni rajtigis min anonci, kvankam ne oficiale, ke jam ekis pritraktado de

interkonsentoj inter la skabeno pri kulturo de Durazzo, d-ro Emilian METAJ, kaj

la Direktoro de Muzeo pri Popola Kulturo en Durazzo (en kiu troviĝas

kompendio "MOISSI"), prof-ro Sali HIDRI, kaj la jam menciita Direktoro de la

Urbaj Muzeoj en Triesto, prof-ro Adriano DUGULIN, por elporti tiun ĉi

ekspozicion pri MOISSI en Durazzo. Kompreneble, tia iniciato, pro sia naturo kaj

pro la streĉoj por ĝin realigi, meritis pli ampleksan disvastigadon sur la albana

teritorio kaj sekve ankaŭ, se ne en Tirana, kiu tro proksimas al Durazzo, almenaŭ

en Valona kaj Scutari.

Memkompreneble, post Durazzo, kiu alprenis sur sin la gravan taskon

konkretigi tion, la komunumoj mem de la du aliaj urboj, kie indus ĝin prezenti,

devus sin ŝarĝi per la sekvaj organizaj kostoj, sed mi estas konvinkita ke oni

devus bone kompreni la preskaj devigan interesen tion realigi, ankaŭ kaj ĉefe pro turismaj kialoj.

Kiel mi estis dirinta komence, en Eŭropo, MOISSI estas konata, pli ol en Italio (ekster Triesto, pro evidentaj kialoj), precipe en germanlingvaj landoj, Aŭstrio kaj Germanio, nome en tiu zono kie pli multe kaj longe artakampe li aktivadis. En preskaŭ ĉiuj tekstoj konsulteblaj fakte, MOISSI estas citita, se ne rekte kiel aŭstriano (lia naskiĝo en Triesto, sub Habsburga regado, tion povus ja pravigi), kiel "aktoro germanlingva". Nur en la lastaj du jaroj de lia kariero, fakte, li recitis itallingve. Jen tial devas ekstarti intereso turisma-muzea, ĉar – kvankam mi mem ne spertas pri tio, sed kredas ke prave oni povas tion supozi – se turisma lanĉo okazos por Albanio, ia konsiderinda kvanto da ĉeestantaro (probable d-ro BOSELLI konsentos pri tio) certe estos germanlingva, kaj tial bonvolu imagi la akcepton kaj intereson kiujn la turistoj alturnos al la ekspozicio, dediĉita al personeco tiel fama kaj amata en iliaj landoj. Ĉi tion mi ja povas certigi al vi, kiel triestano, se mi pensas al tiuj germanaj kaj aŭstraj turistoj, kiuj en Triesto – kiu tamen havas multajn aliajn vidindaĵojn – vere preskaŭ freneziĝas antaŭ la Kastelo de Miramar (statistike la plej vizitata Muzeo en Italio) kun ĝiaj memoraĵoj de Maksimiliano de Habsburgo, frato de la imperiestro Francisko Jozefo, kaj tiuj de Elizabeto de Wittelsbach (Bavario), ĉiumonde konata kiel "Sissi", edzino de ĉi lasta, troveblaj ankaŭ en aliaj lokoj tra la urbo.

Do, espereble tiu ĉi mia eta "ŝtono ĵetita en laĝeton" ekstimulos ian interesiĝon kaj precipe ĉiun eblan institucion, kaj italan kaj albanan, laŭiri vojon, kies spuroj ĉikaze jam videblas.

Mi dankas vin pro la atento.

Faleminderit të gjithëve për vëmendjen tuaj.

Tirana, 9 decembro 2006

Enesperantigis s-ino Elda Doerfler, Triesto, la 3an defebruaro 2007